

N°185
avril
mai
juin
2019

LA INFORMILO

N° 185
aprilo
majo
junio
2019

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2019
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18€

Reta abono: 7,50€



Parce qu'il était ouvert sur le monde, Rainer KURZ avait appris l'espéranto. Il devint un acteur majeur dans la diaspora espérantophone. Sa vie professionnelle se déroule actuellement en Allemagne et en Australie en tant que consultant en télécommunications et dirigeant de www.freelance-market.de.

Il créa lui-même la fondation Rainer Kurz qui œuvre pour la diffusion de l'espéranto et il est en outre vice-président de la fondation FAME qui subventionne des actions de développement dans le monde grâce à l'espéranto.

Avec l'aide d'étudiants de l'université de Hohenheim/Stuttgart, où lui-même avait fait ses études, il lança la campagne "Jobs für Flüchtlinge" (Des emplois pour des réfugiés) où il propose à ces étrangers un accompagnement gratuit pour l'accès à une profession.

Intervjuo kun Reinard Kurz ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=fvMyXleFIWQ>

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

La 4-a LUMINESK' en Königswinter 27.12.2018- 3.1.2019

En 2018 GEA, la Germana Esperanto-Asocio, refoje invitis al sia silvestra jarfina renkontiĝo. Ĝi fariĝis jam la 4a Luminesk. Ĝi okazis en ege komforta kaj eĉ luksa JUFA-hotelo en Königswinter en la proksimeco de Bonn, sur monteto kaj kun panoramo al la Rejnvalo kaj al Bonn.

La hotelo konsistis el pluraj konstruaĵoj. En la centra domo troviĝis la salonoj, la trinkejo, la akceptejo kaj la restoracio.

La dormo-ĉambroj estis tute komfortaj kaj troviĝis en apudaj domoj. Iu domo estis alirebla nur tra pluraj eksteraj ŝtuparoj.

Andreas Diemel estis la ĉefa organizanto, helpata de Barbara kaj Ulrich Brandenburg kaj aliaj kunhelpantoj.

Refoje ĝi komenciĝis jam la 27an de decembro kaj finiĝis la 3an de januaro 2019. Ŝajne tiuj datoj fariĝis nun tradiciaj.

Bone funkciis la transporta servo ekde la stacidomo Oberdollendorf, kie Andreas mem zorgis pri la veturado.

La akcepto en la domo estis rapide farita kun transdono de la dokumentoj kaj ĉambro-ŝlosiloj. Poste necesis trovi unue la domon kaj poste la ĉambron.



OBERDOLLENDORF



La jarfina aranĝo okazis en Germanio en la JUFA-hotelo proksime al la urbo *Bonn*. Partoprenis ĝin 65 geesperantistoj el dek landoj, inter kiuj ankaŭ estrarano kaj ĝenerala direktoro de UEA. Sabate vespere okazis interkonatiĝo en amika etoso kun gustumado de du lokaj vinoj-blankaj kaj ruĝaj.



La estrino de JUFA-hotelo bonvenigas la partoprenantojn per vinoj, blankaj kaj ruĝaj.



Interkonatiĝo kun jam konataj partoprenantoj el antaŭaj Luminesk aŭ IF (Internacia Festivalo) kaj ankaŭ kun tute novaj.

Dum la semajno ni aŭskultis diversajn interesajn prelegojn. De Yoshie kaj Dieter Kleemann ni eksciis pri la insulo *Shikoku* kaj pri tradicioj rilate al la 9-a simfonio de Beethoven.



Por pliaj informoj pri Esperanto ĉe UNESKO eblas konsulti la retejon: www.EsperantoPorUN.org

De Christiane Oeter ni lernis kiel vivi sen kuirilo kaj ni povis gustumi kelkajn ŝiajn vegetarajn ellaboraĵojn.

Rakoen Maertens prelegis pri sia agado en UNESKO kaj UN parolante pri falsaj novaĵoj, misinformo, propagando kaj pri aliaj interesajĵoj. Li ankaŭ prezentis al ni Unesko-kurieron, kiu nun aperas ankaŭ en Esperanto.



39a sesio de Ĝenerala Konferenco ĉe UNESKO en Parizo:

Rakoen Maertens tre kompetente prezentis Esperanton en la asembleo antaŭ la delegitoj..



Yves Nevelsteen parolis pri novaj vortoj en Esperanto, pri Esperantaj markonomoj en Beneluxo kaj pri bitlibroj kaj bitrevuoj. Dima Ŝevĉenko prezentis sociajn retejojn kaj Esperanton. Kun Anna Striganova ili parolis pri la revuo *Esperanto*, kiun ili redaktas kaj pri ilia eldonejo "Impeto". Sur tabloj estis instalitaj libroservoj de FEL kaj de Impeto. Dieter Rooke parolis pri la historio de la Esperanto-literaturo kaj gvidis la internacian ĥoron. Kristin Tytgat gvidis paroligan kurson. Okazis kvizo por eltrovi la plej saĝan homon. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjuo.



Dum la renkontiĝo okazis du tuttagaj ekskursoj: la unua gvidis nin al la monto *Petersberg*, kie ni povis viziti ĝisfunde la faman hotelon, kie en la pasinteco loĝis multaj gastoj de la registraro, kaj kie estis subskribitaj gravaj kontraktoj.



En tiu hotelo ni povis viziti diversajn jam renovigitajn ejojn, salonojn, ĉambrojn, akcepto-salonojn. Krome la gvidantino ankaŭ emfazis gravajn historiajn eventojn ligitajn al tiuj lokoj, okazintaj en la postmilitaj jaroj, kiam Bonn estis la ĉef-urbo de Germanio.



Dume Dieter Rooke ne hezitis motri sianolveblan flagon pri Esperanto

En la apuda urbo *Röhndorf* ni havis eblon enrigardi la iaman domon de la germana kanceliero Adenauer.



Ankaŭ tie okazis grava historiaj eventoj. Jen ĉi-tie la biblioteko de la kanceliero kaj en la ĝardeno troviĝas du bronzaĵaj statuoj de la franca prezidento De Gaulle kaj de la germana kanceliero Adenauer. Ili kune strebis krei pacon en Eŭropo.



La ekskurso finiĝis en la vinmuzeo de la urbo *Mayschoss*, kie ni trarigardis la vinkelon kaj poste gustumis kvar diversajn vinojn de la regiono.

La vinberoj en tiu regiono estas kultivatataj sur ege deklivaj vitejoj, tial ne eblas uzi maŝinojn, ĉio estas farita mane. Malgraŭ tio, dank'al efikaj komercadoj sen kromaj perantoj, la vin-boteloj estis ne tro kostaj.

Temoj de Wera Blanke estis: “Publike paroli "kiel efike interkomunikiĝi” kaj “Kiel traduki *Maulstasche*-terminologiaj konsideroj pri regiona specialaĵo”. (fakte temas pri ŝvabaj ravioloj).

Anna Striganova prelegis pri: “Dronitaj urboj-fabelaj kaj realaj” kaj pri: “Kial nun modas antagonisto?” Vladimir Rodin konigis al ni la historion de la plejlonga transsiberia fervojo. Barbara Branderburg parolis pri la nova biblioteko de GEA.

Ŝi ankaŭ organizis “La Majstrokuiriston ĉe Luminesk”. Tri kandidatoj prezentis sin por la konkurso.

Anna Striganova estas fakulino pri fabeloj historie analizataj.





Organizita de Barbara Branderburg refoje okazis "La Majstrokuiristo". Per kvizo estis selektitaj 3 kandidatoj, kiuj ricevis la necesajn ingrediencojn por kuiri ovojn kaj legomojn. Poste, ĵurio donis poentojn laŭ diversaj kriterioj. Iĝis Majstrokuiristo **Yashovardhan**.

Rudolf Fischer okupiĝis pri ŝercoj. Amri Wandel parolis pri turismado en Israelo kaj Jordanio, invitis la ĉeestantojn al la venontjara Israela kongreso, prezentis la nombron de Esperanto-parolantoj en la mondo kaj parolis pri akvo-ekologio de la Ruĝa al la Morta maro. Bernard-Régis Larue interese rakontis pri la unuaj temploj kaj pri la pordo de la Edena ĝardeno. Ulrich Brandenburg prezentis bildojn pri Finnlando por instigi la partoprenantojn al la venonta UK en Lahti. Ni havis la plezuron gustumi kelkajn manĝaĵetojn preparitajn de lia edzino kaj tipan brandon. Iuj prelegoj estis enkadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU) kaj, ĉe la fino, AIS-atestiloj estis transdonitaj al la sukcesintoj de la ekzameno.

La Silvestra vespero komenciĝis per festa manĝo kaj la balo estis inaŭgurita per polonezo. Dancadon oni interrompis noktomeze por bonvenigi la Novan Jaron. La 1-an de januaro grupo da partoprenantoj promenis en la naturo.



Ĉiuvespere, post la oficiala programo, en "gufujo" okazis varia aldona programero, kiun lerte prizorgis gesinjoroj Kleemann. Por adiaŭa vespero ili preparis krimludon. Ni ankaŭ ĝuis rakonton el Aŭstralio, poemojn kaj fabelojn, ŝercojn kaj peĉakuĉon (prezentado de 20 bildoj prikomentataj nur po 20 sekundojn).



Unu vespero estis dediĉita al la forpasinta Hans-Dieter Platz

(alinome HDP). Omaĝe al li estis montritaj diversaj bildoj el pluraj Internaciaj Festivaloj, kiujn li sukcese aranĝadis dum tri jardekoj en diversaj lokoj de Germanio.



La dua tuttaga ekskurso ebligis al ni ekkoni kelkajn lokojn en la universitata urbo *Bonn*. Unue ni vizitis la muzeon pri historio de Okcidenta kaj Orienta Germanioj, iliaj evoluoj de post la milita epoko ĝis hodiaŭ. Bona tagmanĝo atendis nin en historia restoracio apud la tre bela malnova urbodomo. Posttagmeze ni vizitis la iaman naskiĝdomon de la mondkonata komponisto Ludwig van Beethoven. Restis iom da tempo por promeni tra la placo.



En la historia muzeo eblis kompreni la situacion de Germanio post la Dua Mondmilito. La divido en 4 partoj kaj la apartigo de Orienta Germanio (GDR) kun la starigo de la Berlina muro. Poste la klopodoj krei "aviadilo-ponton" al okcidenta Berlino. Kaj fine post la falo de tiu fama muro ekestis la restarigo de Berlino kiel ĉefurbon de Germanio.



Vizito al la naskiĝdomo de Ludwig van Beethoven. Post la klarigo de Ulrich Brandenburg, eblis promeni tra la diversaj ĉambroj.

Ni partoprenis Luminesk' la unuan fojon. Al agrabla aranĝo ni invitas vin partopreni jarfine. Organizas ĝin Germana Esperanto Asocio (GEA). Dankon pro amik- etosa semajno kaj bona organizado.

Liba Gabalda

Jam okazis la 4a Luminesk kun iom pli da partoprenantoj ol en la antaŭaj jaroj. Ĉi-jare ni bone rememoris pri HDP, kiu organizis pli ol 30 Internaciajn Festivalojn. Mi sukcesis prezenti 150 fotojn pri tiuj IF-oj. Ili estas agrablaj rememoroj pri pasintaj jarfinaj semajnoj.

La fotoj de la lastoj IF-oj estas daŭre videblaj kaj eĉ ekŝuteblaj ĉe:

[Http://esperanto.france.est.free.fr](http://esperanto.france.est.free.fr)

Poste ĉe IF-arkivoj

Andreo



En la kadro de Internacia Vintra Universitato (IVU) pluraj partoprenantoj ricevis diplomojn, transdonitajn en la lasta vespero



Luminesk 2018/2019 en Königswinter

Printempa Esperanto Renkontiĝo en Strasburgo

10^a-12^a de
majo 2019



85^a regiona staĝo de Esperanto en Rejna valo

Kulturcentro Saint-Thomas, meze de la eŭropa kvartalo

Bunta programo, kleriga kaj distra por ĉiu intereso !

Kun la subteno de :

esperanto
France-Est

Organizata de :

esperanto
Strasbourg

Bunta programo

Agrabla loko

Kaj La organiza teamo preparis diversan kaj allogan programon, i.a. :

- kursoj por komencantoj (kun Jeff Schelcher) kaj progresantoj (kun Fabien Tschudy),
- tablo ludoj kaj eksteraj ludoj,
- ekskursoj en diversaj kvartaloj de la urbo, tage kaj nokte, piede/trame aŭ bicikle,
- kant-ateliero kaj koncerteto ekstere,
- koncertoj de Jonny M kaj prezento de "La Kanto Ĝenerala"
- prelego de István Ertl,
- literatura angulo kun Bernard Behra kaj István . . . kaj aliaj surprizoj!

Ankaŭ vi povas kontribui, per peĉakuĉo, prezentaĵo el 20 lumbildoj. Ĉiun vi montros dum 20 sekundoj.

Kaj kiel kutime vizitu la buntan libroservon!



La loko elektita estas renkontiĝejo por grupoj kaj asocioj diversaj. Ĝi situas avantaĝe 300m for de tramhaltejo kaj de la Eŭropaj instancoj (parlamentejo, konsilio, palaco de homrajtoj, kuracilagentejo,...).

La Centro lokiĝas en agrabla parko de trankvila kvartalo de la Robertsau kun fermita parkejo.

La ĉambroj estas komfortaj (ĉiuj kun necesejo, duŝejo, lito- kaj tualetotukoj provizataj) renovigitaj kaj la lunven-salonoj sufiĉe larĝaj por enteni kongreson. Ni ankaŭ povos ĝui la lokan kuirado en la Centro mem.

Aliĝilo al Printempa Esperanto-Renkontiĝo en Strasburgo

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝ-jaro	Kotizoj			Ekskursoj				
			1	2	3	A	B	C	D	E



Adreso.....

Poŝtelefono

Re-adreso

Ekskursoj (tram + vizit-bileto inkluzive) x nombro:

- A. Nokta vizito al la urbocentro vendrede (21a30-23a30) 5 €
- B. Vizito al la hospitala vinkelo sabate (9a30-11a30): 5 €
- C. Vizito al la urbo-centro sabate (15a30-17a30): 5 €
- D. Bicikla vizito al la eko-kvartalo dimanĉe (9a30-11a) 5 €
- E. Perŝipa vizito al la urbo "Strasburgo 20 jarcentoj da historio" dimanĉe (14a –15a15): 15 €

KOTIZOJ SUME.....€

Mi elektas : (indiku nombrojn)	Ven 10	Sab 11	Dim 12
Tagmanĝo x 16€			
Vespermanĝo x 13€			
Tranoktado simpla ĉambro x 42€			
Tranoktado 2 pers. ĉambro x 33€ / pers.			
Tranoktado 3 pers. ĉambro x 33€ / pers.			

Tranoktado Inkluzivas matenmanĝo. Ĉambro kun necesejo, duŝejo, lito-tukoj kaj tualet-tukoj
 Mi preferas manĝi vegetare
 Mi deziras tranokti kun
RESTADO SUME:.....€
 Mi aliĝas al la Printempa Esperanto Renkontiĝo 2019 en Strasburgo
 Mi pagas kotizon, ekskursojn kaj restadon
 entute:€
 plus donaco por la kongresa kaso€
ENTUTE€
 (donancanto ricevos ateston por franca imposto)

je la (dato) : Subskribo :

per monĝiro al konto de Espéranto Strasbourg
 IBAN: FR76 1027 8010 8100 0206 7800 168
 BIC: CMCIFR2A
 aŭ per ĉeko nome de Espéranto Strasbourg

Mi pretas proponi tiun **fulmprezenton** :.....

La aliĝilon kaj pagon sendu :


- rete al printempo2019@esperanto-strasbourg.net
- aŭ papere al Marie-Claude BOREGGIO
 19 rue du Bilstein
 67100 STRASBOURG

Pliaj informoj kaj aktualigitan programon ĉe www.esperanto-strasbourg.net

Kotizoj
 La kotizo entenas la partoprenon al la kurso, prelegoj kaj distra programo.

	Baza kotizo	Rabata kotizo
Ĝis 31-01-2019	30 €	20 €
Ĝis 31-03-2019	40 €	25 €
Post 31-03-2019	50 €	30 €

La rabata kotizo estas por sam-adresulo/handikapito/ sensalajrulo/ studento.
Infano naskata inter 01.01.2005 kaj .31.12.2014: 5 €

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@gmail.com

Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	

1. Rainer KURZ	15. Libro-servo + Roger Degrelle	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Luminesk	16. Libro: Chavet	
3. Luminesk	17. Tempo de kaprinoj+Unesko	
4. Luminesk	18. Unesko Kuriero	
5. Luminesk	19. Enigmoj kaj humuraĵoj	
6. Luminesk	20. Abonoj kaj kotizoj	
7. Staĝo en Strasburgo	21. Prelegoj en Nilvange	
8. Staĝo en Strasburgo	22. Bekkursoj, Kroatio, Kernpunkto	
9. Komitatanoj kaj enhavo	23. Bicikle al Azio	
10. Angulo de la prezidanto	24. Semajno en Les Issambres	
11. Forpaso de Roger Degrelle	25. Semajno en Les Issambres	
12. Libro: Nekonata adresito + ZF	26. Semajno en Les Issambres	
13. Avula Angulo	27. Semajno en Les Issambres	
14. Libro-servo	28. Nia foto-paĝo	

Gesamideanoj,



Forlasis nin pastro Roger DEGRELLE. Li estis ĝisosta esperantisto ekde sia esperantistiĝo. Vi legos ĉi-poste memorigajn liniojn de kelkaj inter ni, kiuj lin bone konis.

Mi mem havis la bonŝancon konatiĝi kun li tuj post la finlernado de la elementa kurso: li gvidis min tra la duagrada perkoresponda kurso per la metodo POR LA PRAKTIKANTOJ. Ekde tiam mi ĝuis lian servo-pretecon kaj konstantan bonhumoron kaj humuron. Vera samideano, kies elkoraj laŭtaj rid-eksplodoj min daŭre akompanas.

E. L.

Roger DEGRELLE: je la servo de la Esperanto-literaturo

Kiel ŝatanto de literaturo mi ŝatus ĉi-tie reliefigi la iniciaton de Pastro Roger DEGRELLE: la kreo de libroservo sine de Association Culturelle de l'Est pour l'Espéranto, la tiama nomo de Espéranto France-Est. Li ne nur kreis la servon, li ankaŭ ĝin administris, kio signifas, ke li disponigis la komencigan kapitalon, ke li elektis la aĉetotajn librojn, ke li ilin mendis, ke li verkis katalogon, kiun li aperigis kutime unufoje jare en LA INFORMILO, ke li ricevis la perpoŝtajn mendojn, ke li enpakis la librojn, ke li iris al la poŝtoficejo kaj la tuton dissendis. Tre certe necesis foje relanĉi nepagintojn, ktp ...

Kroma avantaĝo de tia servo estis la ebleco trafolumi dum Esperanto-renkontiĝoj originalaĵojn kaj tradukaĵojn en nia kara lingvo, kio ĝuste eblis nur dum renkontiĝoj pro la neblo aĉeti Esperanto-literaturon en kutimaj libro-vendejoj. Pluraj tabloj plenplenis de libroj. Ilin necesis paki en kestojn, ŝarĝi en la veturilon, veturigi ĝis la renkontejo, malŝarĝi kaj porti al la tablaro, disponigi kaj poste ilin priatenti kaj enkasigi la aĉetaĵojn.

Li ja komprenis, ke atingo de la Esperanto-movado estis inter aliaj la kreo de originala kaj tradukita literaturo. La sukcesaj vendoj dum niaj kutimaj renkontiĝoj ja pravas, ke li pravis!

Dankon, Roger DEGRELLE, pro via laborego!

Edmond LUDWIG

Bonŝancas nia asocio, ke post pli kaj pli pezaj pastraj devigoj tiun laboregon transprenis samideano Jean-Luc THIBIAS kun la dumrenkonta helpo de Micheline COLNOT. Ankaŭ al ili ni ŝuldas nian dankon.



Kara familio de Roger Degrelle, karaj samideanoj,

La forpaso de homo ĉiam estas bedaŭrinda evento, sed ĉefe doloro por la proksima familio kaj la amikoj. La forpaso de esperantisto estas perdo por la esperantistaro kaj la tuta homaro. La forpaso de Roger Degrelle, vera humanisto, estas perdo por ni ĉiuj.

Tiu forpaso invitas nin fervore prizorgi la lampon de Esperanto, kiun Roger Degrelle flegis por doni lumon al la mondo kaj interkomprenon al la homoj.

Kompaton kaj sincerajn kondolencojn al la familio.

Odette kaj Bernard Behra

Ve! Nia granda amiko mortis, Li, kiu esperante baptis nian filinon Elina. Niaj koroj estos apud vi.

Gérard kaj Denise Greiner

Jean-Luc THIBIAS skribas:

Roger ankaŭ alimaniere agadis por Esperanto. Mi ankoraŭ ne naskiĝis, kiam li eklernis la lingvon (Micheline Colnot povus klarigi pli bone). Se mi bone memoras, li revenis de Alĝerio, kie li devis militservi por iri aŭ reiri al la seminario por studi teologion. Li disponis je eble 3 liberaj semajnoj. Ekde tiam li englutis la 17 lecionojn de la Racia Kurso en 17 tagoj! Jean-Paul Colnot, kiu gvidis lian studadon, diris al mi, ke tuj poste, Roger malfermis kurson en la seminario. Li ankaŭ subskribigis peticion ĉe la pastrolernantoj favore al Esperanto. Kiel unua subskribis la direktoro de la seminariejo.

En Nancy, li ankaŭ longtempe instruis la duagradan kurson (jam antaŭ ol kiam mi esperantiĝis) ĝis lia foriro al Piennes en 1988. Li krome partoprenis en la korektado de la taskoj por la perkorespinda kurso, kaj dum la staĝoj li okupiĝis pri la trapasado de la ekzamenoj.

Ekster la federacio li ankaŭ agadis en la katolika esperantista asocio, sed pri tio, mi ne havas detalojn. Mi tamen memoras, ke li skribis ie, ke foje en Pollando li diris meson en esperanto kaj ke inter la aŭskultantaro troviĝis la posta pola papo, Johano Paŭlo la II-a!

Kompreneble, kiam li fariĝis paroĥestro en 1988, li havis multe malpli da tempo por Esperanto kaj precipe dum la semajnfinoj, kiam li preskaŭ ĉiam devis diri mesojn.

Tiel, dum la lastaj 30 jaroj, malofte oni vidis lin kaj bedaŭrinde novaj esperantistoj ne havis okazon ekkoni lin!

Vi memoras, ke lastjare, mi proponis, ke ni invitu lin en nia regiona staĝo. Sed li aspektis tiel laca, kiam mi telefonis al li, ke videble ne estis realigeble kunveturigi lin al la staĝejo. Mi ekciis dum la funebra ceremonio, ke li prezentis siajn lastajn mesojn sidante sur seĝo!

Estimataj,

Kun malĝojo mi ekciis pri la forpaso de sinjoro Roger Degrelle. Bedaŭrinde mi ne povos ĉeesti la ceremonion, ĉar mi estas momente for de la regiono. Al liaj familianoj bonvolu transdoni miajn sincerajn kondolencojn.

Triste, Claude Nourmont



André CHERPILLOD skribas:

MEMORAĴETO PRI LA PASTRO DEGRELLE.

Mi iom konis Roger Degrelle, neordinaran homon, kiu forte impresis min. Li estis fortika viro, pli granda kaj pli larĝa, ol mi. Li estis simpatia, eĉ facile ŝercema. Lia scio de Esperanto estis perfekta. Sed lia escepta karakterizo estis, ke li kapablis kunigi veran katolikan kredon, certe sinceran (eĉ profesion), kun politikaj opinioj progresemaj, eĉ senhezite maldekstraj. Iam li vizitis la orientajn landojn de Eŭropo (Sovetion kaj aliajn) kaj revenis kun paroloj ĉefe laŭdaj pri ili. Evidente, tio ne havigis al li progresajn postenojn en la klerikara hierarkio. Cetere, li plurfoje partoprenis en la propaganda budo, kiun la parizaj esperantistoj starigis en la ĉiujara Kermeso de L'Humanité. Degrelle havas lokon en miaj bonaj memoraĵoj.

Nekonata adresito Katherine Kressmann Taylor La KromKancerKliniko 33

Nekonata adresito perfekta novelo.
Katherine Kressmann Taylor
Tradukis Claude Gerlat

Necesas legi tiun novelon, por iom pli bone koni la homan naturon. Atentu, vi povus travivi la legadon, kvazaŭ vi ricevus ne atenditan vangofrapon. Ambaŭ germanoj, Makso, judo, kaj Marteno, kiu ne estis judo, kreis en Usono artgalerion. En 1932 Marteno reiris en Germanion. Makso restis en Usono por daŭre funkciigi la galerion. Ambaŭ restis en kontakto per leteroj. La rakonto estas farita nur per tiuj 19 leteroj de Novembro 1932 ĝis Marto 1934. Marteno unue trovis strange la politikan etoson en Germanio. Sed fine aliĝis al tiuj ideoj pro persona intereso kaj pro komforto de sia familio, ĝis eĉ terura perfido kaj maldeca aŭ poltrona sinteno. Makso en Usono provis konvinki Marteno ne fali en tiun danĝeran kaptilon. Vane. Makso tamen petis helpon de Marteno por sia fratino, kiu venis en Germanion rifuzinte kompreni la danĝerecon por judino, eĉ baldaŭa fama aktorino, sin montri antaŭ nazioj. Vane. Fine ... Sed pli bone estus legi la novelon mem.

Nancy Huston, franco-kanadanino vivanta en Parizo ekde 1970, fama verkistino en angla kaj franca, skribis interesan postparolon, pri la novelo de Kressmann Taylor, kiu aperis en la reeldonon en franca "*Inconnu à cette adresse*", eldonejo J'ai lu, 2012. Jen kelkaj plukaĵoj el tiu postparolo: "Oni taksis tiun verkon perfekta novelo. Oni eldonis la novelon en Usono en 1938. Ĝi rapide konis sukceson. En pluraj Eŭropaj landoj, la verko estis tradukita. Poste, ve! La Dua



La KromKancerKliniko 33

Mondmilito okazis, kaj la novelo estis forgesita. Nur en 1995 oni remalkovris ĝin, kaj ĝi reaperis en la franca en 1999. Denove granda sukceso. Ironio de la afero, nek en la unua eldono, nek en la sekvaj oni pensis mencii la fakton, ke tiu teksto reprezentis senesperan provon atentigi la mondon pri la baldaŭa Holokaŭsto! La aŭtorino Kressmann Taylor ne estis aparte klarvida; ŝi nur simple havis apartan esceptan atenton al tio, kio okazis en la mondo, kaj maltrankviliĝis pri tio. Ŝia stilo estas impresa ŝparado: la elekto de la letera formo permesas al ŝi sugesti la ĉefajn eventojn plivole ol ilin priskribi. "

Nun "Nekonata adresito" estas tradukita en Esperanton de Glaude Gerlat, laŭ la originalo "Address Unknown", de Katherine Kressmann Taylor, kun la helpo de la franca traduko "Inconnu à cette adresse", sub la nomo Kressmann Taylor, tradukita de Michèle Levy-Bram. La traduko esta bona kaj agrable legebla. Grave estas ke tiu verko estas nun atingebla en Esperanto, ĉar ĝi bone montras kiel homoj facile povus aliĝi al danĝeraj ideoj: naciismo, rasismo, maltoleremo, malamo aŭ malrespekto por aliaj komunumoj kaj kiuj ĝenerale atencas la liberecon, dignon, sanon, vivon de homoj. Oni ankaŭ vidas la terurajn konsekvencojn de tiaj sintenoj. Ni, esperantistoj provas kompreni unuj la aliajn kaj volas vivi en paco kaj frateco kun ĉiuj homoj. Ni, esperantistoj loĝas samtempe en nia internacia lingvo kaj en la tuta Mondo, do ĉe ni ne estas anoj de etnoj, nacioj, religioj, ideoj aŭ simple fremduloj, sed nur homoj kun homoj. Tiu novelo estas do bona ilo por niaj frataj kaj pacaj ideoj.

Bernard Behra

Zamenhof tago en Nancy

Dimanĉe la 13an de januaro 2019, grupeto da esperantistoj kuniĝis en la restoracio "La Marianne" por festi "Zamenhof-tagon".

Post la gustumado de diversaj pladoj, ili veturis al la botanika ĝardeno Jean-Marie Pelt por viziti ekspozicion pri papilioj.

Oni vidis fotojn de lorenaj papilioj, multajn buntajn orkideojn, informpanelojn pri la anatomio kaj la vivo de diversaj specoj de papilioj, multajn art-objektojn, kiuj montras la uzon de papilioj en diversaj mondkulturoj kaj ...centojn da papilioj, kiuj flugis en vitra domo meze de la ravitaj vizitantoj.

Ni dankas niajn geamikojn, kiuj venis festi la datrevenon de la naskiĝtago de la kreinto de Esperanto.



AVULA ANGULOArmand HUBERT ... *alflugas rememoraĵoj*

Nia mondo tiom rapide kaj funde ŝanĝiĝis dum jarcentospaco. Antaŭ okdek jaroj, infanoj aŭ junaj feriantoj spertis kvazaŭ mezepokan tempon en Nord-Vogeza vilaĝo.

NOV-JARAĴO antaŭ 80 jaroj

Novjara agitado en la vilaĝo! La infanoj devis bondeziri "Bonan jaron!" al la bapto-gepatroj. Kun ekscitiĝo kaj kun petardaj pafkrakadoj.

La komplimento vortumis tiel en la regiono:

"Prosit Nejjohr! E Bratschel wie e Schierdoor un e Woascht wie Overohr!" (franka lingvo uzata en la Norda Vogezo). Nialingve: Sanan Novjaron! Ni havu brecon ampleksan kiel garbejan pordegon kaj kolbason kiel dikan forno-tubon!

Breco estis specifa brioĉa "Bretzel" kiujn infanoj povis alkroĉi ĉebrake.

Post la meso de Novjaro, fratino kaj mi vizitis baptopatrinon kaj praonklinon, Marie Glad. Ŝi estis seninfana kaj pro tio ŝatis akcepti tiajn familiajn oficojn. Jen ni staris antaŭ ŝia enirpordo. Ŝtopilajn petardojn mi havis enpoŝe kaj ardis pafkraki kelkajn. Mi metis unu ŝtopilon surteren; la fratino kaŝis siajn orelojn. Poste firma kalkan-bato! Kaj pafo! La pordo malfermiĝis sekve kaj krude. "Ĉu vi ne baldaŭ ĉesas tiujn krakadaĉojn, simpluloj?"

Grumblante Marie enirigis nin en la kuirejon.

Tiam ni kune kaj ceremonie deklamis la novjaran komplimenton. Praonklino Marie kontentoplena aŭskultis. Ĉi-okaze ŝi ja surmetis festan, gladigitan antaŭtukon. Ne okazis kiso, sed sur la tablo, malantaŭ ŝia dorso atendis nia novjara donaco: du bonodorantaj, grandaj brecoj. Ankaŭ kelkajn bombonojn ni ricevis. Rapide okulumante ni juĝis ĉu la brecoj estis samgrandaj, alkroĉis ni la brioĉon ĉebraĉon kaj forkuris hejmen.

SERVOPRETECO

Praonklino Marie ne estis riĉa. Loĝis ŝi en tre malgranda domo. Nur du ĉambrojn ŝi mastrumis: kuirejon kaj "bonan" ĉambron kun lito. Sed ŝia edzo estis voĵorgisto, do ŝtatoficisto ... kun ĉiumonata salajreto. La kamparanoj nombris lin inter la feliĉaj oficistoj de la vilaĝo, nome tri: la pastro, la instruisto kaj la voĵorgisto.

Estis enviinda situacio en valo, kiu malbone kaŝis sian ĝeneralan malriĉecon. Glad-Patt, li nomiĝis, sed ekster-familie, li estis "la Malglatulo" (de Rubig!). Certe li gajnis tiun krom-nomon pro sia facila senĝentileco. En la vilaĝo oni plue taksis lin ĝisosta pigrulo "Fulenzler": Li pli malfrue ellitiĝis ol kamparanoj kaj ne tro laciĝis kiel najbaroj.) Por fratino kaj mi, Glad-Patt estis atentema praonklo kaj estiminda voĵorgisto. Li ja havis trafan metiformadon: grefti fruktarbojn, prizorgi la multajn pomarbojn laŭ la vojo, bredi abelojn kaj kompreneble priatenti la bonstaton de publikaj vojoj.

Liaj metiiloj estis pritondilo, segilo, falĉilo, pioĉo, ŝovelilo kaj ĉarumo. Glad-Patt, "la Malglatulo" zorgeme priatentis siajn metiilojn. Samkiel sian kaprinon- "bovinon de la povrulo". Blanka besto ĝi estis, ĉiam ties felo estis pura kaj kombita kaj ĝi malavare donacis bonan lakton al la prageonkloj.

Mankis nenio por ĝia komforto: dumvintre, selektita furaĝo kaj ĉiutage, nutriga promenado kun la mastrino.



Blanka kaprino meze de frambo-arbetoj, -ŝatata medio.

Kiam venis la fojnado-tempo, la praonklo ne avaris je helpo. Kvaropa teamo vice foriris al la tondenda herbejo sur monto, je la kvina matene: mia avo, Glad-Patt, onklo kaj mi, la ferianto. Ĉiu ajn havis sian falĉilon surŝultre kaj ĉe la zono, surdorse, bovin-kornon kun akriĝŝtono. Sur la streta vojeto, la akvo en la korno skuiĝis, desaltis kaj akvumis la pantalonojn: Glad-Patt kutimis uzi sakro-vortojn. Sur la herbejo, li estiĝis modelo: lia falĉil-bato estis preciza, lia laboro senripoĉa.

En la ĉirkaŭo aliaj fojn-rikoltistoj sin aktivis.

Venis paŭzo kaj Glad-Patt scivole ekmontris la ĉielon: "Aŭskultu!" ... Alaŭdoj triladis en la alto.

(Sekvo en venonta 'La Informilo')



El nia libroservo

Informoj

⇒ Forpasis Roger Degrelle, la fondinto de la libroservo de nia asocio Esperanto France Est. La sekvonta paĝo estas dediĉita al li!

La libroservo partoprenos la venontan komunan semajnfinojn en Strasburgo la 10/12ajn de majo 2019. La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est: <http://esperanto.france.est.free.fr>. Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!
Jean-Luc Thibias

Libroj verkitaj de André Cherpillod nove alvenintaj



Diversaj lingvoj

1° Dore Domildo Solresol, 28 paĝoj, 3 €, 2008. Prezento de la planlingvo Solresol.

2° Gvidlibro de la amantoj de la bibli-hebrea lingvo, 60p. 4,50€ 2014.

3° Ido, unu jarcenton poste, 48p. 5 €, 2007. Kiel Ido naskiĝis en 1907. Komparo inter Esperanto kaj Ido, foje favora al Esperanto, foje favora al Ido.

4° La japana lingvo kaj ĝia skribo, 12 p. 1,50 €, 2009. Mallonga prezento.

5° Universalglot, la planlingvo de J. Pirro, 36 p. 3 € 2017.

6° Vortaro Volapük- Esperanto kaj Esperanto-Volapük, 208p 15 €. 2003. Kompleta vortaro de la volapuka lingvo (versio De Jong) kun la etimo de ĉiuj volapukaj vortoj.

Lingvaj Verkoj pri esperanto

7° La fondaj tekstoj de Esperanto, prelego, 28p. 2 €. 2009. Unua libro, Fundamento.

8° La gramatika karaktero de la radikoj, 36p. 3 €. 2009. La esperantaj radikoj ne estas neŭtralaj.

9° La inkobotelo de la esperanta transitivo, 20p. 2 €.

10° Prepozicioj, transitivo: la ĝusta uzado, 24p. 2 € 2015.

Historiaj temoj

11° Jesuo, ĉu Dio, ĉu Homo? 36p. 3 € 2011.

12° La Mesio, unu mito tra iranta la jarcentojn, 148p, 12€ 2018.

Diversaj temoj

13° Alĥemio, la mistera arto de Hermes, 76p. 5 €. 2012.

14° Medicina leksikono, esperanta-franca kaj franca-esperanta, 100p, 8 €, 2009. 1800 vortoj.

15° Muzika leksikono, 62p. 4,50 €, 2013. 522 muzikaj tradukoj.

Literaturaj tradukoj

16° Heraklio, la evezano, 28p. 3 € 2019.

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:

-franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
-poŝta ĝiro al "Esperanto France Est"
CCP 0199772W NANCY"
-interbanka ĝiro al "Esperanto France Est"
IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150
BIC PSSTFRPPNCY.

Mendilo por mendi librojn:

Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:

S-ro / S-ino

En la

Subskribo:

La 26an de januaro forpasis nia kara samideano Roger Degrelle. Ordinare tia anonco naskas malĝojon.

Sed, kvankam mi estas tre malbona religia praktikanto, mi memoras pri (proksimuma) diraĵo de Kardinalo Marty, okaze de paska festo aŭ de morto de iu eminentulo, "por Kristano, morto ne estas malgajaĵo" (ĉar transiro al eterna vivo!). Kiel raciisto, mi ne povas diri ĉu estas io post morto, ĉar ĝis nun ne spertis mem la eventon, sed mi memoras pri alia skribaĵo, kiu laŭdire ĉeestis la tombejon de faraono Tout Ankh Amon: "nur prononcu mian nomon kaj vi revivigos min!"

Mi almenaŭ certas ke, se Roger partoprenus niajn komentojn pri li, ĉu fantome, ĉu kiel produktaĵo de nia menso, li serĉakompanus nin kaj vigligus la etoson per sia neimitebla ridado.

Roger Degrelle estis multfaka homo. Antaŭ ĉio, li estis katolika pastro kaj ĉiam zorge plenumis siajn taskojn tiuflanke, ĉu kiel fakpastro, ĉu kiel prizorganto de diocezaj bonfaroj, ĉu kiel paroĥestro. Sed li ankaŭ aktivis en diversaj aliaj movadoj. Li estis kompreneble aktiva esperantisto, sed ankaŭ militis en la 1980a jardeko en la pacmovado, kio estis pli malpli suspektinda en Francio tiutempe. Li ankaŭ partoprenis en loka asocio de defendado de lu-prenantoj de sociaj loĝejoj. Li taksis sin subtenanto de publika instruo. Li ne kaŝis, ke politike, li konsideris sin ĉe maldekstra flanko. Certe li havis pri kristanismo vidpunkton pli aktiveman ol kontempleman! Li iam ekokupiĝis pri du forlasitaj knaboj en danĝera socia situacio. Tiuj deziris, ke li adoptu ilin. Tiel okazis, ke li fariĝis laŭleĝe patro, kio estas ne ordinaraĵo por katolika pastro sed malpermesita nek de la ŝtato nek de Eklezio! Li eĉ edzigis katolike sian filon. Dum la funebra ceremonio, la du filoj kortuŝe dankis al li, kaj Pascal, unu el ili klarigis aparte al ni, ke Roger fariĝis plurfoje avo kaj praavo! Cetere Roger Degrelle estis klerulo, interalie pri historio, muziko kaj beletro. Krom la francan kaj esperanton, li ankaŭ bone scipovis la germanan, la latinan, la grekan kaj verŝajne pli malpli aliajn mortintajn lingvojn, Sed neniam li havis supereman konduton en diskutado kaj ĉiam adaptiĝis al sia kunparolantoj.

Mi ekkonis lin en 1982, kiam, post perkoresponda kurso, mi aliĝis al la nancia grupo. Dudek jarojn post "Vatikano 2", ĝenerale la pastroj ne plu surportis sutanon sed almenaŭ nigrajn kostumojn kun kruceto. Li jam vestiĝis kiel ordinara viro, kaj ne uzis la iom sindeteman pastran parolmanieron, Okaze de regiona semajnfino, mi malkovris la libroservon kaj tuj miris pri ĝi. Dum la sekvonta komitat-kunveno, kiun mi partoprenis kiel observanto, mi sidis apud Roger. Oni demandis, kiu volas kandidatiĝi al komitatanececo. Li levis mian manon, kaj de tiam mi estas komitatano!

Li estis kreinta, de kelkaj jaroj, la libroservon, kvankam la ideo ne vekis entuziasmon en la komitato. Heredinte iom da mono post morto de sia patrino, li investis ĝin por aĉeti stokon da libroj kaj post iom da funkciado povis rehavi sian pruntaĵon.

La ideo estis tutsimpla. Tiam, ne estis tre facile kaj ofte multekoste aĉeti esperantaj librojn, ĉefe eksterlande. La rabato donita de la eldonistoj pro multa aĉeto ebligis kovri la poŝtajn kaj doganajn kostojn, proponi la saman prezon, kiel ĉe eldonisto kaj uzi la "profiton" por pligrandigi kaj diversigi la

stokon de proponataj libroj. La "afero" tiel prosperis, ke Roger iom timis, ke tiu agado ĝis tiam privata estu konsiderata kiel komercado, ekzemple de impostistoj. Li do petis asociigon de la libroservo. Por tio, estis decidite inventari la librojn. Kaj mi estis kunplezure komisiita por helpi lin en tiu laboro.

Ekde de tiam kaj dum pluraj jaroj, mi unu aŭ du fojojn po monate iris al lia hejmo unue por la inventaro kaj poste por kolekti elementojn pri librotenado kaj por kune elekti, kiujn novajn librojn ni mendos. Ĉar li ofte ne povis partopreni la semajnfinojn, tiam mi ŝarĝis la librojn veturilen.

Viziti lin ĉiam estis agrable. Li elektis loĝi en socia domo en Tomblaine apud Nancio, certe ne en la plej luksa kvartalo de la urbaro! Veninte iam en la pruntita aŭto de mia patro, mi eldiris mian timemon pri la sekureco de la parkejo. "Kie restadas via aŭto? Apud la mia! Vi nenion riskas: mi konas ĉiujn malbonajn knabojn de la kvartalo!" Dum horeto, ni diskutis, trikante kafon, pri la libroservaj aferoj sed ankaŭ pri plej diversaj temoj esperantaj aŭ ne.

Ĝenerale la diskuto estis interrompita: foje de junaj fianĉoj kiuj petis rendezuon por prepari geedziĝan ceremonion aŭ de iu perdita familiano, foje de ĉiureligiaj najbaroj, kiuj petis helpon pro konflikto kun loĝiga administrado. Iam telefonis ĵurnalistoj de l'Est Républicain pro plendo de membroj de tiu administrado post iom "bruema" vizito de li kaj aliaj membroj de la asocio de luprenantoj. Iam telefonis la polica servo "pri ĝeneralaj informadoj" por peti precizojn pri internacia kunveno, kiun li organizis loke, kadre de la pacmovado. Roger diris al mi: "mi bone konas tiun policanon, kiu ofte telefonas al mi". Iam, dum iu evento, li afable venis al mi kaj prezentis sin. . . kaj aldonis "sci: vi neniam estos episkopo!".

Tiu agrabla periodo daŭris ĝis 1988, Tiam, li estis nomumita paroĥestro en la urbeto Piennes, 100 km norde de Nancio. Samjare, mi devis translokiĝi al pariza regiono pro laboro. Rapide nia kunlaborado ne plu eblis. Efiĝe transprenis mian taskon gesinjoroj Gilbert. En 1992, reveninte Nacion, mi rekunlaboris kaj vizitis lin en Piennes plurfoje jare, sed malpli ofte ol en Tomblaine. Roger Degrelle estis tiam sola pastro por granda aro da paroĥoj. Partopreno en esperantaj semajnfinoj fariĝis por li kvazaŭ ne ebla. Pro tio, bedaŭrinde, malmultaj samideanoj vidis lin dum la tridek pasintaj jaroj!

Ĉar montriĝis, ke li ne plu povis dediĉi sufiĉan tempon al la libroservo, mi proponis al li prizorgi la tutan aferon kaj transpreni hejmen la stokon.

Fakto, ke li senhezite akceptis transdoni al mi sian "bebon" estis por mi granda fid-atesto. Mi faris mian eblon por montriĝi taŭga sukcesanto.

Atinginte 75 jarojn, antaŭ pli ol dek jaroj, Roger emeritiĝis kaj ekloĝis en Conflans, norde de Loreno. Interilato tamen daŭris perrete aŭ perpoŝte, ĉiam kun granda humuro. Lastjare, mi telefonis al li, sed li ŝajnis al mi ege laca. Mi pripensis viziti lin ĉijare, post mia definitiva ĉeso de profesia vivo.

Bedaŭrinde li la tutan vivon forlasis pli frue! Ĉu lasta ŝerco?

J-L T




**Inter la malnovaj bildkartoj kun Esperanto-temo trovitaj ĉe antikvaŝisto en Fontenoy-la-Joute, ni interesiĝu pri Gabriel CHAVET.
Pioniro de Esperanto en Francio**

Gabriel CHAVET naskiĝis la 14-an de decembro 1880 en Digoïn, apud Macon, kaj mortis la 23-an de oktobro 1972 en Parizo.

La lingvon ESPERANTO malkovrigis al li Alice Roux, lia instruistino pri la germana lingvo. Esperanton li lernis sola en aŭgusto 1896. En januaro 1897 li iĝis lernanto en la liceo de Louhans kaj fondis tie kun kolegoj de la lernejo **la unuan oficialan Esperanto-klubon en Francio**.

Tie li verkis artikolojn por promocii la lingvon. Li eĉ polemikis kun la fama franca ĵurnalisto **Francisque Sarcey**, kiu certe ne estis tre malferma al tiaj revoluciaj proponoj! https://fr.wikipedia.org/wiki/Francisque_Sarcey

En 1900 fondiĝis la Esperanto-grupo de Parizo, en kiu li oficis kiel sekretario-kasisto. Sed en 1903 li malsaniĝis kaj rezignis pri tiuj funkcioj. Poste, en 1905 li estis dungita kiel sekretario de la Centra Oficejo - ne konfuzu kun la Centra Oficejo de UEA -: temas pri oficejo kreita de generalo Hippolyte SEBERT, kiu deziris ke la tiamaj Organiza Komitato (por la organizado de kongresoj) kaj la Lingva Komitato havu komunan oficejon. Li tiel ageme partoprenis la organizon de UK-oj kaj redaktis la oficialajn raportojn.



Li starigis kun Edmond Privat la regulojn de la kontrakto de Helsinki, kiu daŭris de 1922 ĝis 1932, estis prezidanto. aŭ sekretario de diversaj E-istaj grupoj, sekcioj aŭ asocioj, faris multajn paroladojn kaj kursojn, fondis kun Georges Warnier la Librairie de l'Espéranto (Librovendejo de Esperanto) en 1906. **Dum la unua mondmilito li instigis la Subministron de la milita sanitara servado, Justin Godard, ke li sendu oficialan cirkuleron por rekomendi al ĉiuj milit-kuracejoj, disdoni al la soldatoj gvidlibrojn de la Ruĝa Kruco en diversaj lingvoj kun traduko al Esperanto de la frazoj necesaj al la militvunditoj.** En 1932 li daŭrigis sian propagandan agadon en Lille, kie li prezidis la lokan grupon. Li fondis la unuan asocion de Francaj Poŝtistoj Esperantistaj, kun publikigo de broŝuro, En 1911 li partoprenis je la fondo de asocio de Pacifistaj Esperantistoj kun kunlaboro al la revuo *Espero pacifista* (1905-1906) kaj je la fondo de la Rotaria E-o Amikaro, Daŭre li laboris en rotariaj rondoj pri Esperanto.

Liaj verkoj:

Chavet verkis por diversaj E-aj ĵurnaloj artikolojn pri itala, flandra kaj hispana artoj kaj speciale en la periodaĵo "Revue" gravan verkon pri la pentristo El Greco, premiitan en la Floraj Ludoj.

Krome li verkis:

1907: kun Georges Warnier, lernolibron *Espéranto-Manuel* (55000 ekzempleroj venditaj ĝis 1932).

1910: kun Georges Warnier vortaron franca-Esperanto

1912: kun Georges Warnier *Corrigé d'Espéranto-Manuel*.

Li tradukis al Esperanto *Grasa Lignaŝisto*, itala novelo kaj iĝis ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio (1933-1934) kun Louis BASTIEN.

La tempo de la kaprinoj Luan Arif Starova Bjalistoko – Lublin – Ŝwidnik – Ĵurĉevac 2018

Kiel ĉiam en tiu eldonejo: la libroj ege belaspektas. Alia konstato: de dudek jaroj aperas nun verkoj en Esperantujo, kiuj pli kaj pli kondamne priskribas la kruelaĵojn de la iamaj komunistaj reĝimoj en orienteŭropaj landoj.

La tempo de la kaprinoj estas tia traduko de la makedona verkisto, profesoro pri literaturo kaj eksa diplomato, Luan Arif Starova. Kiam oni legas ties biografion, oni tuj komprenas, ke la kadro de la rakonto estas la vivo de lia familio en Skopje post la Dua Mondmilito, kie la familio ekloĝis post vivado en Turkio. Pro kono de la turka lingvo kaj studoj pri la turka historio, la patro iĝis ŝtatfunkciulo en la ĵus kreiginta Federacia Socialista Respubliko de Jugoslavio.

La patro, intelektulo, observas la enkondukon de la reformoj elpensitaj de la dogme blindaj politikistoj cele al kreo de granda laborista klaso. Certe, post la morto de Stalin, iom mildiĝas la reĝimo, sed ne vere. La patrino daŭre klopodas saĝe pluvivigi la multnombran familion. La reziston al tiu desupra ordono kuraĝas la paŝtistaro de la ĉirkaŭa montaro! Tiuj ĉi ne deziras ŝanĝi sian vivstilon, ili ne volas labori en agrokultura kooperativo. Ili do decidis veni al la urbo, sed kun ĉiuj siaj kaprinoj, kiujn necesas loĝigi. . . Profitas de la kaprina lakto la urbanoj, sed ne scias kiel pritrakti tiujn ribelulojn la partianoj – kiuj ja ankaŭ profitas de la kaprina lakto en periodo de malsato!!!

Ilia gvidanto de la paŝtistoj, la ne legokapabla, sed klarvida Ĉango, amikiĝas kun la patro, eklernas la legadon, kleriĝas per ties libraro kaj pere de la kuna diskutado. Kiel ili solvos la konflikton???? E. L.

Unesko-Kuriero: Homaj Rajtoj kaj perspektivoj

La ĉefa celo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) estas kontribui al paco kaj sekureco en la mondo per kunlaborado inter nacioj per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado por antaŭenigi universalan respekton por justeco, por la regado de juro, kaj por homaj, fundamentaj liberecoj kaj toleremo, sendepende de raso, sekso, lingvo, aŭ religio. Unesko ankaŭ kontribuas al daŭri-pova disvolviĝo kaj protektado de endanĝerigitaj lingvoj. Por antaŭenigi la idealojn kaj misiojn de Unesko kaj diskonigi ideojn pri internacie gravaj temoj, Unesko eldonas kvarfoje jare sian oficialan revuon: Unesko-Kuriero.

Unesko-Kuriero estas eldonita de 1948, sed de 2012 pro financaj problemoj la eldono ĉesis. Danke al monhelpo de Ĉinio, Unesko-Kuriero denove aperas papere kaj elektronike de 2017 en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj en Esperanto. La elektronika versio de la gazeto elŝuteblas el la retejoj de Unesko kaj de UEA. La ĉefredaktoro de Unesko-Kuriero en Esperanto, Trezoro Huang Yinbao, kaj la teamo de kunlaborantoj klopodas daŭrigi la eldonon de Unesko-Kuriero en Esperanto kaj aktivas por ke Esperanto iĝu la 7-a oficiala lingvo de Unesko kaj aperu en la internacia listo de Nemateriaj Heredaĵoj de Unesko. Por daŭrigi la aperon de Unesko-

Kuriero en Esperanto gravas plilarĝigi la teamon de tradukistoj kaj provlegantoj. Por havi permeson eldoni Unesko-Kurieron, UEA promesis al Unesko trovi mem la monon por pagi la eldonadon. Do la afero povus ĉesi, se oni ne trovos novajn kaj pli da financaj rimedoj.



Ekde 2017 sep numeroj de Unesko-Kuriero en Esperanto aperis. Ĉiu numero, kun pli ol 60 paĝoj bele ilustritaj, disvolviĝas laŭ kutimaj rubrikoj. En la rubriko “larĝangule” troviĝas la artikoloj pritraktantaj la elektitan temon de la numero (ekz. numero de julio 2018 temis pri “Artefarita intelekto, promesoj kaj minacoj”). La aliaj rubrikoj: “zomo”, “aktualaĵoj”, “ideoj” kaj “nia gasto” (intervjuo), pritraktas la diversajn laborkampojn, agadojn kaj cel-interesojn de Unesko.

La lasta aperinta oktobra “Unesko-Kuriero” temas pri “Homaj Rajtoj, Retro al la Estonteco”. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (UDHR) adoptita en 1948 estas sendube unu el la plej elstaraj dokumentoj en la historio. Do ĉi tiu numero de la Kuriero celas remalkovri la spiriton de la tempo, por ke ni pli bone informu pri niaj pripensadoj pri homaj rajtoj kaj

prezentas elekton de tekstoj senditaj responde al grava enketo pri la filozofiaj fundamentoj de homaj rajtoj, lanĉita en 1947. Pli ol sesdek elstaraj pensuloj reeĥis al la alvoko de la juna Organizo. Mahatma Gandhi estis unu el ili, same kiel Benedetto Croce, Aldous Huxley, Humayun Kabir, Lo Chung-Shu kaj Arnold Schoenberg. La respondoj, iuj tre mallongaj leteroj, aliaj longaj studoj pri la demando, reflektis preskaŭ ĉiujn naciajn grupojn kaj preskaŭ ĉiujn ideologiajn alirojn.

Certe, en la lastaj sepdek jaroj la mondo multe ŝanĝiĝis. Multaj landoj forpelis la kolonian jugon, kaj multaj kulturaj tradicioj reaperis ekde la adopto de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj en 1948. Tamen ĉi tiu penado de Unesko-disvolvi tutmondan filozofion bazitan sur ampleksa scio pri la mondaj



kulturoj-perdis nenion el sia graveco aŭ valideco. En 1949, Unesko kompilis multajn respondojn al la enketo sub la titolo *Homaj rajtoj: komentoj kaj interpretoj*, por helpi krei pli bonan komprenon inter homoj de malsamaj kulturoj. Do en la nuna numero la *Unesko-Kuriero* precize sekvas la saman logikon. Pro limigita spaco oni reprod

reproduktis nur malgrandan parton de la centoj da paĝoj ricevitaĵ de Unesko en 1947. Kvankam la elekto ne povas reflekti la plenan amplekson de la projekto, sed oni prezentas ion por pripensi.

Pli ol la duono de la numero “larĝ-angule” reproduktas tiajn partojn de kontribuoj de la epoko. Jen kelkaj ekzemploj de titoloj de la diversaj partoj de kontribuoj: debato pri la principoj de homa digno, kontraŭ individuisma senelirejo, ekonomiaj kaj sociaj rajtoj, venki la malamikojn de libereco, informo kiel la rimedo por libera penso, klerigado: la fundamento esenca por homaj rajtoj, individuaj rajtoj kaj respekto por ĉiuj kulturoj, la hindua koncepto pri homaj liberecoj, konfucea aliro al homaj rajtoj, homaj rajtoj pro la koloniitoj, sankta kaj universala karaktero por homaj rajtoj, homaj rajtoj kaj kultura perspektivoj, ktp. La aliaj rubrikoj de la numero entenas diversajn artikolojn pri perfortoj kontraŭ virinoj, Mosul, luigi heredaĵon, Ĉada lago, klerigo por enmigrintoj, helpi instruistojn por helpi rifuĝintojn, telefonaj teknologioj, intervjuo de artisto kaj pri Sandy Koffler, kiu fondis kaj estris de 1948 ĝis 1977 la revuon Unesko-Kuriero.

Tiu oktobra numero estas interesa por tiuj, kiuj aparte interesiĝas pri filozofio de la homaj rajtoj. Aliflanke eblas lerni multon pri kulturo, moroj, tradicioj kaj

diversaj problemoj, kiujn travivas popolojn kaj komunumoj tra la mondo, kaj pri la rimedoj, kiujn Unesko proponas. Gratulinda estas la teamo de senpagaj volontulaj kunlaborantoj, kiuj tradukas Unesko-Kurieron en bonegan Esperanton kaj provlegas la tekstojn.

Unesko-Kuriero estas legata de altnivelaj ŝtataj gvidantoj kaj diplomatoj. Ĝi fariĝas grava ilo por informi homojn pri la utileco kaj la valoro de Esperanto. Imagu Esperantujojn ĉe la avangardo de edukado kaj temoj, kiuj rilatas Uneskon. Esperanto gajnas, Unuiĝintaj Nacioj gajnas. Eble Unesko danke rekonos novan rolon, la edukadan de ni esperantistoj, en sia agado.


Unesko-Kuriero en Esperanto estas bona por nia lingvo kaj movado, ĉar montrante la revuon al publiko oni pruvas, ke Esperanto estas serioza afero, okupiĝas pri gravaj aferoj kaj aktoras en internaciaj fakoj, medioj kaj institucioj. Samtempe oni parolas pri la utileco kaj la agadoj de Unesko. En tiu senco venos raportoj pri la agado de la Esperanto movado pere de Unesko-Kuriero tio faros, ke ĉe Unesko oni vidos, ke estas bona sinergio inter Esperanto movado kaj Unesko.

Unesko-Kuriero en Esperanto estas grava afero kaj multflanke interesa, eĉ por la praktiko de la lingvo mem. Danke al tiu agado oni solvas diversajn internaciajn terminologiajn problemojn. Tio riĉigas samtempe Esperanton kaj ĝian konkretan praktikon per malkovro de aspektoj de la sciencoj, de la monda kulturo kaj de ĉiaj sociaj travivaĵoj de la homoj. Pro tio Unesko-Kuriero ankaŭ estas bona kurso-materialo por instrui kaj praktiki la lingvon kaj grandigi la scion kaj konscion de la esperantistoj pri gravaj internaciaj, kulturaj, sciencaj kaj edukaj temoj. Pri tiu pedagogia praktiko Dennis Keefe prelegis, la filmo estas videbla



per interreto, kaj aperigis artikolon en la revuo Esperanto de Februaro 2018. Tiaj konkretaj utiligadoj de Unesko-Kuriero pli solidigas la tradiciajn rilatojn inter UEA, esperantistoj kaj Unesko.

Bernard Behra



Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Alparolas la fimao-direktoro:

"Nu, Adriano, jam unu jaro pasis, de kiam vi dungigis en la firmao kiel simpla telefon-deĵoranto. Jam semajnon poste vi iĝis komerco-vizitanto kaj monaton poste fak-responsulo en fabriko-sektoro. Antaŭ kvar monatoj vi fariĝis vic-prezidanto...

Nun estas tempo por mi emeritiĝi... Mi planas transdoni al vi la postenon de ĝenerala direktoro de la firmao... Kion vi opinas pri tio?

- Nu, nu, grandan dankon!" respondas la dungito.

, "Ĉu nur tiun simplan dankon vi taksas sufiĉa?... miras la direktoro

- Ja, ne dankon paĉjo!.."

Riĉa usonano vizitas Aŭstralion. Li hazarde alparolas kampanon, kiu fiere informiĝas:

"Ĉu en via ranĉo troviĝas tiom vastaj tritiko-kampoj?

- Memevidente! Eĉ pli grandaj ili estas!"

La kampano, pro ekscitiĝo, invitas la usonanon al sia propra ranĉo..

"Vidu miajn bovojn! Ĉu la viaj estas samaj?

- Maldeca demando! La miaj pezas dufoje pli!...

Subite aperas aro da saltantaj kanguruoj..

"Nu, kiaj strangaj bestoj estas ĉi-tie!...

-Hum, se mi bone komprenas, vi ne havas lokustojn en Teksaso!.."

La eta Bruno demandas sian patron:

"Paĉjo, kio estas heredeco?

-Nu! Malfacile tion klarigi...

Tamen jen ekzemplo... Se mi ne kapablas naskigi infanon... tiam ankaŭ vi ne kapablas!"

La regula aŭtobuso estas jam plenplena. Juna virino sukcesas tamen eniri ĉe la lasta haltejo kaj klopodas teni sin ĉe iu dorso-apogilo. Iom pli aĝa viro ekstaras, ridetante al la junulino, invitas ŝin sidiĝi sur la liberigitan sidlokon... sed ŝi tuj petas lin per ĉarma rideto kaj ĝentila premo sur lia ŝultro, ke li restu sidanta.

Post iom da tempo, li refoje volas ekstari, sed ŝi refoje premas lin al lia sidloko. Je la kvara fojo, li sukcesas firme ekstari kaj

HORIZONTALE:

1. Azia animal'. Oranĝa plumba oksid'.
2. Denove gajni. Prefikso.
3. Abundeco de ĝuigaĵoj. Etendaĵo de akvo.
4. Sciad'. Negi. Sufikso.
5. INVERSE: rabobesto. Koro de kastoro.
6. Soldat' kiu fuĝis.
7. Difinita irvojo inter diversaj eblaj. Konjunkcio.
8. Litera nomo. Prepozicio.
9. Supernatura estulo. INVERSE: amori.
10. Afrika ŝtato.

VERTIKALE:

1. Tropika animal'.
2. Meteor-ŝton'. Litera nomo.
3. Blanka metal'. Sufikso.
4. Komenciĝi. Malver'.
5. Granda franca urb'. Egipta suna dio.
6. Ĉef'. Sufikso.
7. Batali per armiloj. Malgranda.
8. Fratin' de la patro.
9. Nei. Tia, sen koro. Lirika poem'.
10. Piktogramo. Vira vesto.

petegas:

"Sinjorino, mi vere jam tro veturis je tri stacioj. Ĉu nun vi tamen konsentas, ke finfine mi povas elaŭtobusiĝi?"

La edzino forlasas la banĉambron kaj finfine liberigas la ejon por la edzo, kiu malpecienis.

... Subite, aŭdiĝas sonorado ĉe la enirpordo.

La virino provas rapide kovri sin per la ban-tuko, kiun ŝi volvas ĉirkaŭ sin. Tiam ŝi malfermas la pordon, kaj rekonas Petron, la najbaron, kiu tute surpriziĝas antaŭ la preskaŭ duon-nuda virino..

"- Hum. kara Paŭlino diras duonŝerce Petro mi donos al vi 800 eŭrojn.... se vi faliĝas vian ban-tukon"

Unue ŝokita, Paŭlino ridetas pro la ŝerca propono.. sed ege rapide cerbumas kaj murmuris... "800 eŭroj jen tamen interesa sumo..." Dume daŭre ŝprucas akvo en la banĉambro,... tiam ŝi lasas la tukon fali planken.

Tiam aŭdiĝas voĉo de la banĉambro: "Paŭlino, pri kio temas?"

- Ne gravas nur Petro, kiu deziris renkonti vin.

- Jes ja, mi preskaŭ certas, ke li venis por redoni al mi la 800 eŭrojn, kiujn mi pruntedonis al li antaŭ monato."

Solvo de la KVE de La Informilo 184

Horizontale:

1. KABRIOLET. 2. UBLIET. KA. 3. LIUT. LION. 4. TOBOGAN. 5. KIA. 6. RARIGI. NN. 7. IEBO. DEFI. 8. SRU. NOBLA. 9. TOLED. RUN.

Verikale:

1. KULTURIST. 2. ABIO. AERO. 3. BLUBARBUL. 4. RITO. IO. 5. IE. GAG. ND. 6. OTLA. IDO. 8. EKO. INFLU. 9. TANZANIAN

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2019 ĝis 2021

La abon-periodo 2018 jam finiĝis per la lasta numero 184. Ĉi-tiu numero 185 jam estas la unua de la jaro 2019. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 186 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2019.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2019 - 2020

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2018. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

		Jaroj:	2019	2020	2021
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2019	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2019 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2019, 2020				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)				
	4. Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 3,40 = 15,40 eŭroj

Momerige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio) 4+1,70=5,70 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sūzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 7 = 19 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn,

tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,30 + 1,70 = 7 eŭroj

Prelego pri Kroatio en Nilvange fare de Alan Neves KOVACIC 2019/01/17


La asocioj “Forum des Citoyens” kaj Esperanto-Thionville bonvenigis la partoprenantojn ĉe la kultura trinkejo “Le Gueulard” en Nilvange (Moselle).

Alan, nia gasto tre bone majstras la francan kaj Esperanton. Ĉefe li prelegis en la franca ĉar en la publiko, entute 18 homoj, ĉirkaŭ 8 ne scipovis Esperanton.

La prelego de Alan, ĉiam bonhumora, estis tre alloga. La tempo pasis tiom rapide, ke ni ne rimarkis, ke jam du horoj pasis! Apenaŭ plu estis tempo por demandoj. Sed ni ĝuis vere viglan prelegon, kie Alan sukcesis starigi dialogon inter li kaj la ĉeestantoj, petante, kiuj jam estis en Kroatio, kaj kiel ili tien iris, kaj plue demandante dum la prelego.

Li desegnis la mapon de sia lando sur tabulo kaj skribis sur ĝi:

- aero 56 510 Km²
- loĝantaro: 4,224 milionoj
- 3 naturaj geografiaj aroj:
 - norde Slavonio
 - en la centro etendiĝas ebenaĵoj inter la du riveroj Slava kaj Drava
 - ĉe la sudo, la Adriatika maro kun 1 000 insuloj inter kiuj 600 estas loĝataj



Li prezentis ĉefe la historion de Kroatio kiu havas pli ol 14an jarcentojn kies 500 jaroj da sendependeco. Ankaŭ li rakontis pri Eŭropo kun kelkaj anekdotoj pri Francio. Ni malkovris tiel multe pri la mezepoka Kroatio kiel tiu de la 20a jarcenta ĝis la nuna epoko! La lando Jugoslavio en kiu kuŝis Kroatio estis kreita la 01/12/1918. Hitlero invadis Jugoslavion la 07/03/1941. Pro tio mortis 1 miliono da homoj! Post la dua mondmilito Josip Broz (Tito militnomo) estis ŝtatestro dum 35 jaroj! Li estis tre gaja kaj populara! La 08/05/1980 oni funebris lin kiel faraonon! Jugoslavio estis disigita en la jaro 1991. Unue la eksa respubliko de Jugoslavio Slovenio eniris en la Eŭropan Union. Pli poste alia respubliko Kroatio aliĝis al la sama unio.

Ĉiuj estis ravitaj pro tiu tre riĉenhava prelego. Nur ni bedaŭris ke Alan ne parolis, pro manko da tempo, pri la kulturo kaj beleco de sia lando.

Kurso laŭ la zagreba metodo

La sekvantan tagon Alan tre ŝatis promeni en Thionville. Poste, ĉe nia nova kunvenejo en Thionville, li prezentis al 8 esperantistoj kiel funkcias la zagreba metodo. Li gvidis kurseton laŭ tiu metodo, kiu tre interesis la partoprenantojn.

Informas:

HENRY Bruno

Esperanto Thionville

Maison des Associations Raymond Queneau

5 impasse des Hauts-Fourneaux

Zone du Gassion

FR-57100 THIONVILLE

Tel.: 09 86 54 00 09


esperantothionville@laposte.net



Socia kurso de Esperanto en Nilvange

Dennis KEEFE usona esperantisto la 22an de novembro gvidis BEK kurson en la kultura trinkejo "Café Culture Le Geulard" en Nilvange apud Thionville (Moselle). Ni invitis lin por kuraĝigi niajn komencintojn el nia klubo. Tiun celon ni atingis! Dennis miksis en tri grupoj komencintojn kaj spertulojn. Li klarigis al ni, ke la kurso konsistas el 5 % ĝis 10 % da instruado kaj alia tempo oni praktikas. Laŭvice ĉiu faris demandon al alia, kiun ni prenis el la leciono. Poste ni refaris la samajn demandojn sed la lernantoj devis kaŝi la respondojn kaj respondi laŭ sia memoro. Du spertuloj kontrolis ĉu la grupoj bone laboris kaj ili klarigis gramatikon al la lernantoj. Ankaŭ Dennis uzis senparolan filmon de Charlie Chaplin. Dennis montris iom post iom parteton de la filmo kaj ni devis rakonti la sekvon. Tio estis tre amuza kiam ni malkovris la sekvantan parteton.

La kurso daŭris de la 9a ĝis la 17a kun paŭzo por tagmanĝi. La kafejestroj Sonia kaj Maŭro kuiris italajn nudelojn kun kokidaĵo kaj kunmanĝis kun ni. El proksima Luksemburgio Claude kaj Brian venis tagmanĝi por renkonti Dennis kaj ni. Posttagmeze kelkaj klientoj kaj muzika grupo kiu prepariĝis por la sekvanta programo aŭdis Esperanton. Eĉ Maŭro la kafejestro reklamis por Esperanto! Ĉiam dank'al Esperanto-France kaj Yves Nicolas ni ĝuas interesajn prelegturneojn!



Informas:

HENRY Bruno

Esperanto Thionville

Maison des Associations Raymond Queneau

5 impasse des Hauts-Fourneaux

Zone du Gassion

FR-57100 THIONVILLE

Tel.: 09 86 54 00 09

esperantothionville@laposte.net

Kroatio registris Esperanton kiel kroatian kulturheredaĵon

La 11-an de februaro la Ministerio por Kulturo de Respubliko Kroatio (Administra ofico por protekto de kulturheredaĵo) dissendis al 21 adresoj SKRIBAN DECIDON de la Ministerio pri tio ke la TRADICIO DE ESPERANTO havas en Kroatio karakteron de nemateria kultura fenomeno kaj enskribis ĝin en Registron de kroatia kulturheredaĵo. La decido estis sendita al 19 Esperanto-organizaĵoj en Kroatio kaj al Instituto de etnologio kaj Instituto por kroata lingvo

KERNPUNKTO

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj

Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP153 Elektropovumaj retoj - Baza infrastrukturo de nia nuntempa socio malofte priparolata
- KP154 Genealogio - La scienco de familia historio

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

- MvP018 Esperanto kaj scienco - Podia diskuto dum KAEST 2018 pri la rilato inter Esperanto kaj scienco

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje/>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

Cele al Japanio/ Objektif Japon

Laura kaj Benoît biciklas en Azio

2019-02-03

En **Bankoko** (Kamboĝo) ni renkontis la klubon Verda Elefanto kaj estis gastigitaj de esperantisto. Kiel kutime ni spertis bonan bonvenigon. Ni nun estas alvenantaj en la urbo **Ubonratĉathani Ubon Ratchathani** (อุบลราชธานี) en orienta Tajlando preskaŭ ĉe la landlimo kun Laoso. Ni baldaŭ reeniros al Laoso kaj planas reveni al **Hanojo** (Vjetnamio) la 6an de marto ĉar miaj gepatroj alflugos tien la 7an de marto. Ili vizitos nin tie dum 2 semajnoj. Post la 23a de marto ni forflugos al **Osako** (Japanio) kaj tie trafos nian celon! Ni fartas bone kaj la tajlandanoj



Laura kaj Benoît kun Trezoro Huang Yinbao kaj esperantistoj el la urbo Pingliang (Ĉinio)



Tajlandaj biciklistoj, kiuj helpis nin trovi nian hotelon. Ni nur haltis ĉe biciklo-vendejo kaj ili tuj helpis nin!

estas agrablaj.

Dankon al la homaro, kiu ĉie helpis, kuraĝigis, regalis kaj gastigis nin!

Dankon ankaŭ al Esperantujo, sen kiu, ni spertus nian vojaĝon komplete malsimile. Esperanto estas kiel granda familio, kies membrojn oni trovas ĉie tra la mondo!

Ni dum ĉi tiu jaro biciklis 15 700 kilometrojn, trairis 18 landojn, estis gastigitaj fare de multege da homoj/familioj, kiuj havis bonan koron eĉ kelkfoje iom da scivolemo.

Fakte jes, ni agnosku, ke ni estas

iomete malkutimuloj, ĉie oni rigardas nin per aliaj okuloj sed neniam ni spertis malbonajn intencojn.

Se vi trairas la mondon per paca agado kaj kompreneble grandaj ridetoj vi povas sperti agrablan bonvenigon.



La klubo Verda Elefanto en Kangkoko kun nia gastiganto Trirat, maldekstre de mi.



"Phanon rung" kamboĝa templo, kiu situas en tajlanda flanko.

Jen la sinsekve trapasitaj landoj

Francio
Svislando
Italio
Slovenio
Kroatio
Serbio
Bulgario
(Turkio per buso, nur 50km per biciklo)
Kvartelio
Azerbajĝano
Irano
Turkmenio
Taĝikio
Kirgizio
Kazaĥio
Ĉinio
Laoso
Tajlando.
Poste:
Vjetnamo, de tie ili veturos al Japanio

Bedaŭrinde ni ne havos

sufiĉe da tempo kaj mono por trairi Ĉinion duafoje.

Ni deziras al vi feliĉan ĉinan novjaron. La jaro de la porko! Ĝis!

Interŝanĝo de mesaĝoj tra ĉina telefon-aplikaĵo *We Chat* inter Benoît kaj Bruno Henry el Changhsa (Ĉinio)

Ligilo al facebook: Objektif Japon: <https://m.facebook.com/groups/209710346267557?ref=bookmarks>

La 13a MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2019



Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

2a de marto – 9a de marto 2019

Jen la tradicia printempa rendevuo por pluraj samideanoj, kiuj deziras kune ĝui la komenciĝantan printempon en agrabla Esperanto-etoso. La hotelo Vacancel plene taŭgas por tia semajno ĉe la Lazura Marbordo.

La 13-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

Revenis la gesamideanoj al tiu printempa semajno, ĉe Mediteranea bordo. Multaj jam estis konataj de antaŭaj jaroj. Partoprenis 93 geesperantistoj el deko da landoj. La ĉefaj organizantoj estas *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* kun helpo de aliaj esperantistoj.

La programo konsistis el kvarnivelaj kursoj de veraj komencantoj ĝis la plej altaj diskutoj kaj analizoj. Pri komencantoj okupiĝis Christine Graissaguel, progresantojn instruis Michel Dechy laŭ la libroj de Tinĉjo. Li uzis ankaŭ "La bildstrioj kiel lernolibro", kajerojn kiujn li eldonis. Katerina Arbekova el *Novosibirsk* uzis ludmetodan instruadon kun multaj bildoj, proverboj kaj mallongaj rakontoj.

La plej spertajn lernantojn instruis Emanuele Regano el Italio. Liaj filozofiaj prezentoj kaj debatoj pri diversaj temoj, estis pripensigaj kaj nesolveblaj. Temis ekzemple pri problemo de etiko, justeco, perforto, vegetarismo kaj veganismo. Oni parolis pri genro kaj sporto, identeco de transgenro al transsekso. Tamen multaj demandoj restis ne responditaj, la partoprenantoj ne sentis sin vere koncernataj pro tro foraj filozofiaj temoj.

Dum la matenaj kafo-paŭzoj, kiujn zorgeme pretigis Monique Prezioso kun sia amikino Simone Marlier, ankoraŭ viglis diskutoj en etaj grupoj.



Emanuele Regano gvidis la kvaran nivelon





Dum unu posttagmezo ni vizitis ekspozicion pri orkideoj en *Roquebrune-sur-Argens* ĉe la familia entrepreno de Michel Vacherot, kiu funkcias ekde la jaro 1886-a. Ni admiris centojn da belegaj, diverskoloraj kaj diversformaj ekzotikaj floroj kaj aŭskultis konsilojn pri ilia kultivado kaj reproduktado. La vizitantoj povis ankaŭ aĉeti ilin.



En la vesperoj okazis tre interesaj kulturaj prelegoj. Pri Siberio rakontis Katerina kaj lerte proponis kvizon pri ĝi. Michel Dechy multon scias pri la bildrakontoj de Tinĉjo kaj eĉ instruas pere de ili. En sia prelego li prezentis la humuron de Hergé kaj multajn detalojn en la bildoj kaj rakontoj. Aparte ŝatata "Tinĉjo en Tibeto". Nina *Korjnevskaja* montris ege belajn bildojn pri la folkloro, kaj legendoj de diversaj nacioj en vasta Rusio: Baŝkiroj, Uzbekoj, Tataroj.

Ege interesa estis la filmo de Jean-François Cousineau pri "Ekspedicio en Suda Afriko". Dum la vizito al Namibio, Bocvano kaj Zimbabvo li spertis eksterordinarajn travivaĵojn kun sia edzino kaj aliaj partoprenantoj.

La posttagmezoj estis liberaj kun proponitaj programoj. Vizitoj al ekspozicioj, promenadoj en la naturo apud la maro, sur montaj vojoj kaj padoj.

En la ekspozicio pri orkideoj eblis admiri tiom da diversaj floroj kaj ties ege belajn kaj variajn kolorojn. Dezirantoj povis aŭskulti klarigojn kaj rekomendojn por enpotigi orkideojn.



Interesa estis ekskurso al *Tourves*, kie troviĝas *Musée des Gueules Rouges*. Tie ni ricevis kaskojn kaj promenis en artefarita instalaĵo imitanta la baŭksit-minejon. La gvidantino rakontis pri la peza kaj malfacila laboro de la ministoj. Por tiuj laboroj estis uzataj ankaŭ azenoj lokitaj tie porvive. En la muzeo ni povis vidi maketo-instalaĵon de ĥemia procedo por produktado de aluminio el baŭksito. En vitrinoj estis prezentataj diversaj aluminiuj objektoj.



La 8-an de marto gesinjoroj Prezioso alportis bukedojn da mimozo plukitajn en sia ĝardeno kaj ĉiu virino ricevis branĉeton por memorigi la Internacian Tagon de Virino.

La duontaga ekskurso okazis merkrede. Per aŭtobuso ni veturis al Baŭksito-minejo. Baŭksito estas la erco por produkti



aluminion. Ĝi havis la kromnomon: "Muzeo de ruĝaj faŭkoj", ĉar baŭksita estas ja ruĝa. Fakte la muzeo estis repliko de vera minejo. Tamen oni proponis al ni surmeti protektajn vestaĵojn, har-protekto-reton kaj kolorajn kaskojn. Sed tiel eblis klare montri al la vizitantoj, kiel funkciis tia minejo, kiaj estis la diversaj metiistoj bezonataj por pluteni la minejon kaj por elpreni la baŭksiton.

Eĉ la lifto ŝajnis profundiĝi je 300 metroj.

Krome la gvidantino ankaŭ emfazis la evoluon de la minejo en diversaj epokoj de la 19a jarcento al la 20a jarcento. En tiu periodo klare ĉio evoluis al diversaj maŝinoj kaj teknikoj.

Por produkti aluminion oni bezonas baŭksiton per kio oni faras aluminon (aluminio-oksido). La aluminion oni produktas per elektrolizo, kiu bezonas ege multe da elektro, por unu tuno da aluminio necesas 1,9 tuno da alumino, 380 kg da karbo, 100 kg da gudro-restaĵo, 15 kg da alumina fluoro kaj 13000 kvh da elektro.

Aliflanke eblas facile recikli aluminion, ĝis 95%.

En 1989 tiu minejo estis fermita.

La monda produktado de baŭksito ege kreskis ĉefe en subĉielaj minejoj en Aŭstralio kaj en Afriko, ankaŭ en Brazilo kaj Suda Koreio.

Malgraŭ protestoj tiu forta konkurenco kaŭzis la definitivan fermon de Baŭksito-minejoj en Francio.



Aliajn tagojn ni promenis ĉe la lagetoj Villepey, vizitis la urbon Fréjus kaj St. Raphaël.



Jam de pluraj jaroj sinsekve okazas la Mediteranea Esperanto-Semajno en agrabla ĉemara loko en *Les Issambres*, kie tiutempe floras mimozoj. Flavaj buletoj forte odorantaj karakterizas la francan Provencon. Ili estas tradiciaj simboloj de feliĉo kaj de bonaj rilatoj. Ĉi-jare en la belega feriejo *Vacanciel* kuniĝis 93 geesperantistoj el dek landoj. Eĉ el la plej malproksima Siberio venis du

partoprenantinoj. Samtempe la hotelo gastigis grupon da biciklantoj.

Posttagmezan sabaton bonvenigis nin per aperitivo s-ro Silvain Ceccoto la estro de la feriejo *Vacanciel*. Post la vespermanĝo la organizantino de la aranĝo Christine Graissaguel prezentis al ni la ĉi-jarajn kursgvidantojn. Poste sekvis interkoniĝo. Mi informis la ĉeestantojn pri la fervojista kaj hispana kongresoj, kiuj okazos ĉi-maje en Malago.





Nina Korĵenevskaja prezentis al ni la urbon Ufa, kiu situas en Rusio apud Uralo kaj poste rakontis pri la folkloro en Rusio, kiun ŝi akompanis per bildoj.



Refoje Jean-François Cousineau prezentis sian filmon. Ĉi-foje pri vojaĝo al Suda Afriko kun vizito al 4 landoj. Eblis malkovri lokajn tradiciojn kaj ankaŭ multajn endemiajn bestojn.



Al la okazaĵo venis ĵurnalistino por intervjui kelkajn samideanojn kaj fari komunan foton. Sabate aperis artikolo en la loka ĵurnalo Var-matin.

ROQUEBRUNE-SUR-ARGENS

L'espéranto, langue bien vivante !

Comme chaque année, les Issambres accueillent les Espérantistes pour une semaine de stage

Lastan vesperon la hotelo proponis aperitivon al la gastoj. La direktoro dankis al ĉiuj ĉeestantoj prezentante la tutan skipon de siaj kunlaborantoj. Niaflanke okazis adiaŭa vespero kun tombolo kaj diversaj artaj prezentoj. La kursanoj ludis diversajn teatraĵojn, deklamis kaj la koruso sub la gvido de Bernard Bigonnet kantis kelkajn esperantajn kantojn. Dancado en akompano de akordiona muziko de la fratinoj Prezioso daŭris ĝis noktomezo.

Dankegon al la organizantoj de la bela evento kaj ĉefe al la familio Prezioso, kiu faras ĉion eblan por kontentigi ĉiujn partoprenantojn, kiuj trankvile ĝuas la semajnon. Ĝis la revido venontjare!



Raportas Liba kaj Andreo. Fotoj de Hubert kaj Andreo



**Nia foto-paĝo:
Bela vintro en Slovakio
Fotoj de Darina sur la monto:
Biely Kameň Blanka ŝtono**



**En Ĉinio jam aperis
printempaj floroj
Fotoj de Neĝeta sur la
suda insulo Hajnano**

